

Pacmesaĝoj tra la mondo

エスペラント語を使って集めた
世界の平和メッセージ



Pacmesaĝoj tra la mondo

Unuan fojon mi ekpensis kolekti anglajn pacajn mesaĝojn el eksterlandaj partoprenantoj en “Granda Manifestacio kontraŭ nukleaj armiloj” okazinta en 1984 en Tokio, por transsendi ĝian pacan etoson al miaj gelernantoj. Tiu mesaĝokolektado disvastiĝis inter instruistoj de la angla lingvo en la tuta Japanio kaj multe kontribuis al paca movado. Mi eĉ eldonis etan libron titolitan “Pacaj mesaĝoj”.

Antaŭ kelkaj jaroj mi rememoris tiun sperton kaj kolektis pacajn mesaĝojn en la Azia Kongreso okazinta en Mongolio en 2010, kaj poste en la UK en Kubo en la sama jaro. En la sekvanta jaro mi kolektis mesaĝojn pere de Delegita Reto.

Aperis en Japanio ĉefministro Abe, kiu kontraŭas nian pacan konstitucion kaj pli kaj pli atencas demokration. Pro tio mi pli serioze kolektis pacajn mesaĝojn en la UK-oj en Lille kaj en Nitra. La nombro de kolektitaj mesaĝoj atingis 166 el 56 landoj. Vere Esperanto havas grandan forton kaj esperantistoj estas vere pacamaj kaj sinceraj. En tiuj malmultaj okazoj mi povis kolekti tiom multe da mesaĝoj!

Ĝis nun mi faris panelojn el tiuj mesaĝoj kaj montris ilin en kunsidoj, sed en efektiveco mi havis malmultajn okazojn por tio, do mi decidis fari libron el tiuj mesaĝoj.

La libro konsistas el tiuj mesaĝoj, japanaj tradukoj kaj fotoj. Por igi la libron bela, mi presigis ĉiujn fotojn en koloroj, kuraĝe elspezinte multe, sed kun malalta prezo. Mia vivo ne estos tre longa, do ŝpari monon por paco kaj Esperanto ne estas rekomendinde. Mi decidis agadi ĝis mia ĉerko per la tuta forto. Mi atendas vian mendon.

Pacmesaĝoj tra la mondo

ブラジル Brazilo



Brazilo estas lando de pluraj migrantoj, el malsamaj popoloj, ĝi estas la lando de ĉiuj. Por tio, brazilanoj deziras pacon al tuta mondo, ĉar miaj geavoj elviris al tuta mondo.

Chris, el Brazilo.

ブラジルはいろいろな国から来た移民の国です。ブラジルはすべての人々のための国です。だから、ブラジル人は世界に平和を望みます。だって私たちの先祖は世界中から来たのですから。
クリス

「憲法九条にノーベル賞を」に署名する人。(エスペランティスト九条の会)の分科会。多くの参加者があった。Nobel-premio al la 9a artikolo de japana konstitucio!



Libro-formo: A4-formato, 192 paĝoj

Prezo: 1500 enoj (15 eŭroj). Pagu al mia UEA-konto: hoyo-p.

Sendkosto: al Eŭropo 7 eŭroj (SAL) kaj 12 eŭroj (aerpoŝto),

al Azio 6 eŭroj (SAL) kaj 9 eŭroj (aerpoŝto)

Mendu ĉe HORI Jasuo 2-13-3 Ootone, Maebaŝi, Gunma, Japanio 371-0825

Retadreso: hori-zonto@water.sannet.ne.jp